

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



55-a jaro - n° 4

Aùgusto - Septembro - Oktobro 1963

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj
ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE tel. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL
ISERENTANT ROGER
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO
DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK tel. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DRO DENOËL POL, 10 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTINO ŝAKESTRINO POR KONGRESOJ

PLYSON J. 23, PLACO E. FLAGEY, BRUSELO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO ŝAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAN 232, ANTWERPEN tel. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS tel. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

POŝTKONTO DE B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

Eldonejo-librejo SONORILO

Kerkstraat 61
Brugge
P.C. Nr 1521.40

A. ESPERANTO KALENDARO KUN SVISLANDAJ PEJZAGAJ EN KOLOROJ :

Belega kalendaro, formato 34 × 27 kun 12 tutpaĝaj belegoj kolorfotografajoj de tiu pitoreska landeto en la koro de Eŭropo. Sur ĉiu paĝo, dorsflanke de la koncerna pejzaĝo troviĝas detala klarigo en Esperanto.

Prezo (sendkostoj enkalkulataj): 60,— F

La kalendaro estas havebla meze de septembro 1963. Tiuj kiuj jam havis tian kalendaron dum la jaro 1963 certe ankaŭ demandas ekzempleron por 1964.

B. NOVELDONAĴOJ AU AKTUALAĴOJ :

— Amuzo per scienco (dekaj da sciencaj eksperimentoj klarigitaj per vortoj kaj desegnaĵoj) — bele bindita	55,—
— Andoro, lasta feŭda ŝtato (historio pri tiu nana ŝtato — riĉe ilustrita)	76,—
— Antologio de Brazilaj rakontoj	72,—
— Bulgara Prozo (lukse bindita)	112,—
— Ĉeĥaj fabeloj (kun tutpaĝaj kolorilustraĵoj)	28,—
— Japanaj fabeloj (kun tutpaĝaj kolorilustraĵoj)	28,—
— Faktoj pri Islando (ilustrita)	22,—
— La lingva problemo en la internaciaj rilatoj (I. Lapenna)	13,—
— Fabeloj IV de Andersen (ilustrita) (eldono de « Heroldo de Esperanto »)	150,—
— Sipestro rakontas (bindita)	90,—

C. MALNOVAĴOJ (elĉerpitaj eldonoj kaj malfacile akireblaj verkoj: ĉiuj lamaj eldonoj de la famkonata « Literatura Mondo » de Budapeŝto)

— De paĝo al paĝo (literaturaj profiloj: Baghy, Forge, Szilagyi, Dresen, Schwarz, Kalocsay, k.a.)	45,—
— Johano la brava (en traduko de K. Kalocsay)	39,—
— Mia spektro	43,—
— Romaj elegioj kaj la Taglibro	30,—
— Verkoj de Fez	100,—
— Tri homoj en boato	75,—
— Streĉita kordo (K. Kalocsay) — poemoj	80,—
— Interpopola konduto (Edm. Privat)	50,—
— Bakŝis (skizoj el la vivo de la Egiptoj)	100,—
— Romano de San Michele	175,—
— Trans la fabeloceano (F. Szilagyi) - bindita (kun lignogravuraĵoj)	165,—
— Amo de Toojuuroo (teatraĵo) — el la japana trad. J. Simomura	20,—
— Rimporetroj (de K. Kalocsay) (kun portretoj de famaj Esperantistoj)	25,—

N.B.: ĉar nia stoko de kelkaj de tiuj verkoj estas tre malgranda nur la unuajn mendantojn ni kapablos kontentigi.

D. Ni ankaŭ povas liveri ĉiuj broŝurojn politikajn lasttempe eldonitajn de Ĉina Esperanto Ligo kiel: « Malakordoj inter K-do Togliatti kaj Ni » — « Leninismo kaj moderna Reviziismo » — « Komentario pri la deklaro de la Komunista Partio de Usono » ktp. ktp. — Prezo po broŝuro: 4,— F kaj 8,— F laŭ la amplekso.

REZULTOJ DE BELARTAJ KONKURSOJ SOFIA 1963

Originala Poezio :

- 1) Miyamoto Masao (Japanujo) pro « La rememoro jam fora » ;
- 2) Jiri Korinek (Ĉeĥoslovakio) pro « Salute al la 48-a » ;
- 3) Mario Sola (Italujo) pro « Medito ».

Tradukita Poezio :

- 1) Julius Balbin (Usono) pro « Babij Jar » de Evgenij Jevtuŝenko
- 2) Jiri Korinek (Ĉeĥoslovakio) pro « Paco » de František Branislav ;
- 3) H.W. Holmes (Anglujo) pro « La asfodeloj » de William Wordsworth.

Originala Prozo :

- 1) Sen Rodin (Italujo) pro « Unua morto » ;
- 2) Michel Duc Goninaz (Francujo) pro « La mirinda urbo » ;
- 3) Srĝ Arangelovic (Jugoslavio) pro « Sur dalmata fiŝistinsulo » kaj
- 4) Andreo Szabo (Hungarujo) pro « Mesaĝo de la hejmo » ;

Originala Dramo :

- 1) Emilija Lapenna (Jugoslavio) pro « Mistera Voĉo » ;
- 2) Vasil Zahariev (Bulgarujo) pro « Kontraŭulo » ;
- 3) Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio) pro « Ebruloj ».

Premio « Nova Talento » :

Wouter Pilger (Nederlando) pro poemtraduko « Odo al Holando » de P.A. de Genestet.

La Libro de la Jaro.

« Otelo » de William Shakespeare en traduko de Reto Rossetti.

Oratora Konkurso :

- 1) S-ro S. Ŝwistak (Pollando) pri « Kiel reciproka aprezado de kulturaj valoroj povas kontribui al interkompreniĝo inter la popoloj » ;
- 2) Kyotaro Deguchi (Japanujo) pri « Kia estu la enhavo de kultura agado de junularo » ;
- 3) Diccon Masterman (Britujo) pri « Kiel reciproka aprezado, ktp ».

Deklama Konkurso

F-ino Svetlomira Atanasova Velikova (Bulgarujo).

La 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofia

SABATON, la 3-an de agosto 1963

Hieraŭ vespere alvenis en Sofion la pli grandaj grupoj de kongresanoj. La limstacio kaj aliaj fervojaj stacioj survoje al Sofio estis ornamitaj per Esperanto-flagetoj kaj kongresaj afiŝoj. Hodiaŭ matene svarmis en la Kongresejo — la impona Sofia Ŝtata Universitato « Kliment Ohridski » — kiel en abelujo. Renkontiĝis malnovaj konatuloj, kreiĝis novaj amikecoj. Viglas ĉio. Cetero aliĝis al la kongreso pli ol 3400 kongresanoj, kaj alvenis konsideranda nombro de tiuj, kiuj ne aliĝis, sed venis sen aliĝo. Laŭ tio-ĉi tiu kongreso estas la plej multnombro vizitita Esperanto-kongreso postmilita (la Jubilean 44-an en Varsovio partoprenis 3256 anoj). 45 landoj estas reprezentitaj, inter ili ankaŭ gesamideanoj el Sovetunio — por la unua fojo post la Dua mondmilito.

La Komitato de UEA okazigis sian unuan kunsidon, kiu daŭris preskaŭ 5 horojn. Oni traktis sep punktojn inkluzive la ĝeneralan diskuton pri la Estrara Raporto por 1962/3. Oni elektis komisionojn pri financoj, pri la Laborplano kaj pri lernejoj kaj decidis okazigi novajn elektojn de Komitato kaj Estraro en 1964.

Inaŭguro de la 8-a Internacia Infana Kongreseto okazis en Domo de la Pioniroj. Al la kongreseto partoprenis 60 infanoj el 10 landoj (el tiuj 8 el Britujo). La inaŭguro konsistis el kanto, salutoj de infanoj el ĉiuj landoj.

Interkona vespero okazis en la ejoj de Universiado, la plej granda sporta halo en Bulgarujo. Ĉeestis pli ol 3000 gekongresanoj. La vespero estis inaŭgurita per granda koncerto de Blinduloj, poste sekvis solkantoj kaj balo, kiu daŭris ĝis frumatenaĵ horoj.

DIMANĈON, 4-an de agosto

Inaŭguro de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en solene ornamita grandega sporta halo de la Universiado de Sofio. Ĉiuj 3500 sidlokoj pleniĝis de kongresanoj, pli ol 300 devis stari ĉirkaue. La inaŭguro komenciĝis per « La Espero », kiun kantis la bulgara kanthoruso « Svetoslav Obretenov », gvidata de la Akademia profesoro Dimitar Ruskov.


La kongreson malfermis la prezidanto de UEA profesoro d-ro Hideo Yagi, dankante unuavice al la alta protektanto de la Kongreso, la unua vicĉefministro de Popola Respubliko Bulgaro, Georgi Trajkov, al la urbo Sofio — urbo de parkoj kaj ĝardenoj. Post tio revuis 60 da infanoj-esperantistoj el 10 landoj, kiuj kantis la kanton « Esperanto estas la lingvo por ni ». Unu el tiuj, Maria Bubeva, 14-jara el Bulgaro, salutis fortvoĉe la Kongreson.

Aŭdiĝis fanfaroj kaj post tio — granda surprizo: Reprezenta grupo de pioniroj — kelkcent geknaboj, vestitaj en pitoreskaj naciaj kostumoj, aperis kaj pleniĝis ĉiuflanke la ceteran liberan spacon en la grandega halo. Ni aŭdis popolan kanton, kiu same kiel kostumoj kortuŝis la ĉeestantojn. Sekvis bonvenigo de la prezidanto de LKK Nikola Aleksiev, kiu unue donis iom da statistiko pri la nombro de la kongresanoj laŭ unuopaj landoj, poste dankis al la estraranoj de diversaj organizaĵoj, redakcioj de gazetoj, televido, radio k.a. por ilia helpo.

Dankajn vortojn eldiris la vicprezidanto de UEA, s-ro Holmes, unuavice al LKK, kiu antaŭ du jaroj komencis sian malfacilan laboron.



La libertempa sorto de tiuj kiuj NE ĉeestis la Universalan kongreson en SOFIA.



Probu foje la telefonnumeron de mia korespondantino Eva!

En la nomo de la Bulgara registaro faris salutparoladon Georgi Trajkov, la unua vicĉefministro de Popola Respubliko Bulgaro.

Li diris: « Kiel vi scias, jam multajn sinsekvajn tagojn la tuta homaro vivas sub la signo de granda ĝojo pro la triumfo de la paco kaj la prudento, esprimita en la kontrakto parafita en Moskvo inter Sovetunio, Usono kaj Britlando pri malpermeso de la atom-nukleaj eksperimentoj en la atmosfero, la kosmo kaj sub la akvo. Tiu-ĉi interkonsento estas unua kaj reala paŝo, kiu povas konduki al radikala ŝanĝo de la tuta internacia klimato, kaj firma fundamento por daŭra fortikigo de la tutmonda paco. Ĝi estas brila venko de la principo de paca kunekzistado. »

Li finis sian paroladon per jenaj vortoj: « Karaj geesperant-

tistoj, nia popolo treege ĝojos, se vi forportos en viaj koroj bonajn rememorojn pri la tagoj pasigitaj en nia lando, pri viaj renkontiĝoj kun ĝi, pri ĉio farita de ĝi en la konstruado de la nova vivo. Mi ne dubas, ke multaj el vi, ekkoninte la belaĵojn de nia Patrujo kaj ĝuinte la bulgaran gastamon, deziros ankaŭ alian fojon veni al ni por ripozi en agrabla medio ĉe la maro aŭ sur la monto, ĝoje akceptitaj ne nur de viaj amikoj — esperantistoj, sed ankaŭ de la ceteraj bulgaraj civitanoj ».

Dankajn vortojn al la vicĉefministro esprimis la vicprezidanto de UEA s-ro E.L.M. Wensing substrekante, ke Bulgario kaj Sofio eterniĝos en la analoj de la historio de Esperanto.

Post tio la ŝtata kantĥoro « Svetoslav Obretenov », konsistanta el 90 personoj en naciaj kostumoj, donis dekminutan programon.

Sekvis salutoj de la reprezentantoj de registaroj i.a. per Belgujo Drs F. Roose. Dro Denoël salutis nome de la B.E.F.

Je la fino S-ro G. Warighien, la Prezidanto de la Akademio de Esperanto faris la festparoladon. Komence li prezentis skize kelkajn valoraĵojn, kiujn donis ĉi-tiu lando al la homaro kaj substrekis ke sur teritorio de Bulgario naskiĝis la unua slava literatura lingvo kaj forĝiĝis kirila alfabeto. Bulgario ludis ankau pioniran rolon sur esperanta kampo: du jarojn post naskigo de Esperanto fondiĝis Esperanto-Klubo, la kvara en la mondo, kaj de tiu momento la flamo de esperantismo neniam estingiĝis en tiu-ĉi lando. Ekzemple « Bulgara Antologio » de Krestanov estis pionira tiaspeca verko kaj aldoniĝis novaj sukcesoj, inter kiuj li menciis la romanon « Sub la jugo », « Bulgara prozo » kaj grandan vortaron bulgara-esperantan.

Bulgara Arta Vespero okazis en plenplena granda salono de Universiado. Komenciĝo per trikvaronhora mallfruiĝo.

La programo konsistis el du partoj: klasika kaj folkloro. En la klasika partoprenis la renomaj bulgaraj operkantistoj (Blagovesta Karnobatlova, soprano: Todor Bonev, tenoro; Sonja Hamernik, mezsoprano; Katja Popova, lirika soprano; Stefan

karavano al la suno

Kvankam alia raporto en sekvonta numero de « Sonorilo » rakontos pri la travivaĵoj de la karavano al Sofio, organizita de S-ro Gr. Maertens, mi volas tie-ĉi menci i unu de niaj plej belaj momentoj, ĉar ĝi ja apartenas al la ĝenerala esperanta afero: la akcepto de tiu karavano fare de la Ĉeĥo-Slovakaj esperantistoj! Ĉie kie ni estis trapasantaj ili atendis nin dum horoj. Pro la mallfruiĝoj la kuneso ofte povis daŭri nur duonan horon; tamen ili estis feliĉegaj! Kaj ni ne malpli! En Brno la gesamideanoj atingis ke interesa ekspozicio malfermiĝis por ni speciale du tagojn antaŭ la oficiala tago. En Telĉ ne estas esperantistoj. Do, la gesamideanoj venis de la 24 Km. distanca Jihlava! Ankaŭ ili devis atendi dum horoj. Kaj por ĉiu de ni ili estis alportintaj memorarojn! La vespera kunveno en Praha estas neforgesebla! Pro la akcepto, la entuziasmo, la konvinkaj kaj elkoraj paroladoj. Jen estas vere konvinkitaj esperantistoj! laŭ la koncepto de Zamenhof!

Olganĉec, baso; violonisto Emil Kamilarov kaj dancistino Margarita Trajanova. Ili altnivele prezentis al la publiko la verkojn de Bizet, Verdi, Rahmanjinov, Rimski-Korsakov kaj aliaj. Ĉiuj artistoj estis laureatoj. Bedaurinde eĉ ne unu teksto estis tradukita.

La duan parton, la folkloran, malfermis la kantistino vestita en nacia kostumo. Si bonege kantis la naciajn kantojn, sed en la bulgara. La kantoj pli plenigis la programon ol la dancoj, viglaj, temperamentaj, prezentitaj de la ensemblo « Majakovski », la renoma folkloro kolektivo, premiita multfoje en la lando kaj ekster ĝi.

La entuziasma publiko multe aplaudis precipe al dancistoj, kiuj per sia temperamento forgesigis kaj forviŝis la kongresan lacecon je la 23 horo, kiam finiĝis la sukcesa aranĝo.

LONDON, 5-an de aŭgusto 1963.

ISU okazigis sian duan prelegon en salono « Zamenhof ». Prof. Gaston Waringhien prelegis pri la temo: « La ellaborado de Esperanta leksikologio ». Li prezentis historion de la esperantaj vortaroj, precipe la vortaron de Zamenhof, la tri epokojn de la Esperanta leksikologio: la propaganda, la klasika, la periodo de ĝenerala uzado.

Je la 10,30 Unua Ĝenerala Kunveno de U.E.A. okazis en salono Zamenhof kaj konsistis el du partoj: salutoj de fakaj organizaĵoj kaj dua parto dediĉita al la Junulara Jaro. Partoprenis 40 personoj.

Sub prezido de S-ro E.L.M. Wensing viciĝis salutoj de fakaj organizaĵoj.

La duan parton de la Ĝenerala Kunveno de U.E.A. gvidis la prezidanto de TEJO Günter Becker. Reprezentantoj de Organizaĵoj aliĝintaj al la Tutmonda Junulara Organizo salutis la kunvenon kaj promesis akceli sian agadon por disvolvigo de fruktodona laboro. La dua parto de la kunveno estis dediĉita al la Internacia Lingvo Esperanto kaj la nuntempa junularo. La vicprezidanto de TEJO Inĝ. Simcon Simeonov mallonge raportis pri agado de Kongreso en Vraca. Pri kultura aktiveco de junaj geesperantistoj kaj pri la laboro inter la lernantaj gejunuloj parolis Svoboda Zlatnar. Oni substrekis la signifon de Junulara Esperanto Revuo « Kontakto », kiu ludos gravan rolon por la alproksimiĝo de la gejunuloj en ĉiuj landoj. Fine la prezidanto S-ro Günter Becker apelaciis al la junaj esperantistoj krei naciajn grupojn en ĉiuj landoj kaj kontaktiĝi kun la gvidantaro de TEJO.

ISU okazigis prelegon de Prof. Petr Dinekov pri evoluo de la bulgara literaturo. Partoprenis 100 personoj.

Tutmonda Esperantista junulara organizo okazigis kunvenon, kiun partoprenis 50 gejunuloj kaj prezidis Carlo Minnaja, vicprezidanto de TEJO.

Internacia Scienca Asocio Esperantista okazigis sian jarkunvenon, kiun partoprenis 48 personoj. La tagordo konsistis el malfermo de la jarkunveno, la raporto pri agado en 1962 jaro, diskuto pri la raporto kaj aktualaj taskoj, la baza laborprogramo de ISAE, la decidpropono Werner Haferkorn, eldonado de lernolibroj, propagando dum fakaj kongresoj kaj Internacia Esperanto-Universitato. Raporton de la Estraro de ISAE prezentis Prof. D-ro Boja Popoviĉ, Ĝenerala Sekretario de ISAE. Oni decidis plifortigi laboron en unuopaj sekcioj de ISAE.

La Urbestraro de Sofio akceptis pli ol 1000 reprezentantojn de la Kongreso en Universiado, kie ili estis abunde regalitaj per diversaj manĝoj kaj trinkaĵoj. La Vicprezidanto de la Ĉefurba Konsilantaro, Vasil Krstin bonvenigis la kongresanojn je la nomo de la Ĉefurba Konsilantaro kaj tuta loĝantaro de Sofio. Post emfazo de la vidindaĵoj de la ĉefurbo ili substrekis, ke la devizo de la ĉefurbo estas: « Ĝi kreskas, sed ne maljuniĝas ». Ĝi estis centro de la antikvaj Tracoj. Sed nun ĝi estas tute nova urbo.

TEATRA VESPERO.

En la salono de la Ŝtata Muzika Teatro « Stefan Makedonki » la Internacia Arta Teatro okazigis en la plena salono prezentadon de tri unuaktaj teatraĵoj.

Samtempe en Nacia Operejo alia Teatro, Bulgara-Esperanta Teatro, sukcese prezentis la teatraĵon « Komedio de Eraroj » de W. Shakespeare.

MARDON, 6-an de agosto 1963.

Blindula Kongreso daŭrigis sian laboron.

ISU okazigis prelegon de F-ino Marjorie Boulton pri la temo: « Metaforoj, kliŝoj kaj slangoj ».

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo « Stelo » okazigis kunvenon, kiun partoprenis 60 membroj, prezidis Lars Olsson.

Afrika Programo. En salono « Zamenhof » kolektiĝis 1500 personoj, al kiuj Tibor Sekelj, la gvidanto de Karavano de Amikeco tra Afriko, prezentis la sukcesojn atingitajn. La karavano konsistis el 4 jugoslavo, 2 poloj kaj 1 sviso kaj ĝi rondvojaĝis Orientan Afrikon - Egiption, Sudanon, Somalion, Etiopion, Kenion kaj Tanganikon. Ofte la partoprenantoj uzis Esperanton, pruvante tiamaniere ĝian utilon. Siajn impresojn pri Orienta Afriko prezentis la Usona ĵurnalisto Mark Star. Je la fino oni projekcis interesajn diapozitivojn.

Bankedo okazis en luksa hotelo-restoracio « Balkan », kie eble pli ol 1000 personoj plenigis ĉiujn salonojn.

Oficiala Balok okazis en granda salono de « Universiado » kie okazis ankaŭ la inaŭguro de la Kongreso. Pli ol 3500 personoj amuzis sin aŭskultante la belan muzikon, dancis au babilis kun novaj au malnovaj esperantistoj.

MERKREDO, 7an agosto 1963.

Universala Medicina Esperanto-Asocio okazigis kunvenon kiun partoprenis 81 personoj, kaj oni prezentis organizajn raportojn kaj legis specialajn raportojn. Prezidis D-ro Todor Todorov. Oni pridiskutis interkonsenton kun firmoj por financi medicinan revuon, eldonon de bulteno dufoje jare, kunlaboron kun Ruĝa Kruco, viziton de famaj kuraĉlokoj en Bulgario.

Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj okazigis sian ĉefkunvenon kun raporto kaj prelego, kiun partoprenis 35 personoj, prezidis Roman Sakowicx, Pollando. La tagordo konsistis el malfermo, fikso de la tagordo, salutparolo en la nomo de Bulgaraj esperantistoj, raporto pri la agado 1962/63, elekto de la plenuma komitato 1963/66, prelego pri la koncepto de la proprieto en Bulgario kaj Pollando kaj akcepto de la bilanco.

Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj okazigis publikan pedagogian kunvenon; partoprenis 230 personoj. La temo estis: Rimedoj por profesia kapablo de instruistoj antaŭ kaj dum la kariero.

sekvo en la sekvonto numero

KARAVANO AL LA SUNO

Kiam ni alvenis al la landlimo Jugo-Slavujo-Bulgarujo, meze en la nokto, Ni rimarkis ke granda streĉtuko en esperanto-lingvo bonvenigas nin. La reston de la vojo ni faris en mallumo kaj do ne rimarkis ĉu io samspeca estis videbla aliloke. Sed, transpasante aliajn urbojn, kiel ekz. Stanky, Dimitrov, ni rimarkis samajn streĉtukojn, multajn esperanto flagojn. Sofio mem staris tute en la signifo de la kongreso: multegaj flagoj, fostoj, streĉtukoj; kaj multegaj anoncoj en la restoracioj. Tiel ke prave ni povas konkludi ke tiu kongreso estis granda evento por la tuta lando.

Tio montras ankaŭ ke la aŭtoritatuloj estas al nia afero tre favoraj. Plie, aliaj faktoj montras en tiu direkto: La inaŭguro, la bankedo ofertita de la urbestraro, la manifestacioj en aliaj urboj. Tiel ke ni faras la demandon: kial tiuj aŭtoritatuloj ne enkondukas oficiale nian lingvon en la lernejoj? Jes kial? Estas evidente ke la ĝeneraligo estus plie avantaĝo por ĉiuj Balkanaj landoj kaj kulturoj. Ĉu ia konsidero pri alia(j) registaro(j) kiu(j) eble ne ŝatus tian faron de iu malpli forta lando?

FOTO-KONKURSO OKAZE DE LA KONGRESO

Unua premio — 30 lv. — Dobos Szilvester (Hungarujo) — por la tuta lia verkaro kaj speciale por la foto « Televidspektatoro »; Dua premio — 20 lv. — pseudonimo « Poupa » — Vilho Setälä (Finnlando), por lia tuta verkaro kaj speciale por la foto de la maljunulo-barbulo;

Tria premio — 10 lv. — Miroslav Ribaček (Ĉeĥoslovakio) — por lia tuta verkaro kaj speciale por la foto « Motociklisto ».

Dua Somera Restado en la KASTELO de

La kastelo de Grésillon, kiun la Francaj esperantistoj aĉetis kaj de kiu ili aranĝis kulturdomon, estas jam fama inter la esperantistoj. Tamen tre multaj ankoraŭ ne konas ĝin. Tio estas bedaŭrinda afero... precipe por tiuj gesamideanoj mem. Tiu restadejo kuŝas iom ekster vilaĝo Baugé, en la graflando Anjou, kiun oni prave nomas « la ĝardeno de Francujo ». La kastelo ne estas luksa; sed estas en ĝi ĉio necesa kaj ĝi situas en belega regiono. Idealo por ripozi dum kelka tempo. Ĉiujare estas organizataj kvin restadperiodoj. Ni ĉeestis la duan someran en kiu okazis « la kulturaj kaj turismaj internaciaj ferioj ». Envenante oni staras kompreneble antaŭ nekonataj personoj. Sed jam post neimageble gaja, optimista, feliĉiga en tiu « hejmo ». Kiam, du tagoj, tiuj nekonatoj fariĝis vera familio. La atmosfero estis dimanĉon la 14an, ĉiuj estis alvenintaj, la estraro starigis la definitivan programon. Okazis matene kurso kaj unu konferenco. Post tagmeze estis ekskurso aŭ konferenco. Vespere estis gajiga programo ĉu per kantoj kaj societaj ludoj ĉu per filmo en esperanto aŭ diapozitivaj. En la serio de la konferencoj estis tri de Drs. F. Roose el Brugge pri « La spirito de la Renesanco » en kiu li klarigis la arton de tiu epoko kaj la tutan spiritostaton de ĝi. Poste, dum iu posttagmezo je la 17a horo okazis ideointerŝanĝo pri la temo. En alia mateno la sama paroladinto skizis la historion de la urbo Brugge kaj montris tre belajn diapozitivajn pri ĝi. S-ino Cheverry, prezidantino de la grupo de Angers, paroladis pri sia urbo, pri la Loire-kasteloj kaj pri la florkulturado en Anjou. Ankaŭ ŝi montris tre belajn diapozitivajn. Angla samideanino S-ino Major faris prelegojn pri intern. kongresoj ne-esperantistaj, pri tradukado kaj interpretado kaj pri la instruado de esperanto en Skandinavio. Fine S-ino Roux prelegis pri kantoj kaj pri « la suno kiel fonto de l' vivo ». Ni menciis ankaŭ la nomon de f-ino Vazon kiu gvidis la kursojn. Ekskursoj estis al kelkaj famaj Loire-kasteloj de Langeais, Azay-le-rideau, Chinon, Villandry (gvidado: S-ino Roux); al Angers (gvidado S-ino Cheverry) kie la « Syndicat d'initiative » akceptis nin per honorvino kaj kelkaj alparoladoj. S-ino Cheverry kaj s-ro Roose dankis. Alia ekskurso kondukis nin al la Zoo de La Flèche. Aliaj kelkaj iris al la belega « Lum- kaj sonludo » en la kastelo de Le Lude. Du ĵurnaloj publikigis fotojn kaj raportis favore: « La Nouvelle République » kaj « Le Courrier de l'Ouest ». Multaj amu-

GRESILLON

13 tot 27 juli 1963

zigis la ĉestintojn vespere per ŝercoj kaj ludoj; tion faris S-inoj Major kaj Roux; s-ro Roose kaj aliaj. Okazis ankaŭ libro-ekspozicio kun komentario. Ja la kulturdomo vendas esperanto-librojn; kaj estis tempo sufiĉe por ripozige legi. En la liberaj horoj oni promenadis en la belega regiono aŭ oni naĝis, aŭ ping-ponggludis ktp. Tiel forpasis tro tro rapide tiuj belegaj kaj instruplenaj tagoj; Se ni ŝuldas multan dankon al la supre nomitaj personoj, ni certe ne povas forgesi la gesinj. Micard kaj ges. Gibez kiuj respondecis pri la ordo kaj pri la domo mem. La fino de tiu ĉi raporteto, kiu ne kapablas redoni la belegecon ĉiuf flankan de tiu restado, estas varma alvoko. Gesamideanoj, vi DEVAS iri tien! Vi travivos unikaĵon kiun la neesperantista mondo ne kapablas doni al vi. Vivu Grésillon!

Unu kiu ĉeestis.

P.S. Ĉiujn informojn donas S-ro Micard Kastelo de Grésillon en BAUGE (Maine et Loire) Francujo.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S. P. R. L.

Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabeloj; KATOKULO, por signalvitroj.

Korespond-anoncoj

- La jenaj gesamideanoj nepre volas korespondi kun iu el nia lando/
- 1) S-ro Ladislav Fiala fervojisto
Fügnerova 28 PODEBRADY Ĉeĥoslovakujo (Ĉ.S.S.R.)
 - 2) S-ino Milka Kostadinova
Pozitano 50 SOFIA Bulgarujo
 - 3) S-ro St. Panska Jihlava
Zhorovska 4 Ĉeĥoslovakujo (Ĉ.S.S.R.)

MARGENNOTOJ

PRI LA 48-A UNIVERSALA KONGRESO EN SOFIA

Estis sendube ankaŭ iom da propagando por la reĝimo en tiu kongreso. Tion evidentiĝis i.a. kelkaj oficialaj alparoladoj kaj kelkaj « arangoj ». En St. Dimitrov troviĝis sub granda portreto de Zamenhof streĉtuko kun la slogano : Komunismo estas la estonto de la homaro » kvazaŭ Zamenhof estus dirinta tion. Estas kompreneble ke tio ŝokis ne malmultajn gesamideanojn. Se do estis tie-ĉi intermiksigo de politiko kaj esperanto, ni ne dubu ke multaj orient-cüropaj esperantistoj sincere kredas ke ilia politiko kaj esperantismo paralele marŝas en la historio kaj sur la vojo de la progreso de la homaro. Ankaŭ tie-ĉi la historio ripetiĝas. En antaŭaj jarcentoj (kaj eĉ nun, ie kaj tie) iu reĝimo kaj iu religio estis nedisigeble kunigitaj ; ankaŭ kun sincera kredo en la bono de tio.

Tiu kongreso havis multajn belegajn aferojn. Pri unu tre malbona punkto nitamen volas ankaŭ atentigi : la malordo. Efektive en la kongresejo kaj en la funkciado de la L.K.K. estis tro da malordo. Ni aŭdis multajn plendojn pri la aranĝado de la loĝado. Kelkaj estis en vere tre embarasaj situacioj. Ni konstatis ke en unu sola budo oni aranĝis tri diversajn fakojn ; dum ke en alia angulo estis tri aŭ pli da budoj por nur unu fako. Ni poste konstatis ke ĉiam restis amasego de atendantaj personoj antaŭ tiu speciala budo kaj ke post du tagoj la aliaj restis senokupaj. Tamen ili, kontraŭ ĉiu logiko, ne transprenis parton de la troŝarĝita budo. Kia afero kun la envenintaj korespondadoj ! kaj kun la kartoj por la diversaj prezentadoj ! La esperantistoj rajtas ne plu akcepti tian malordon. Niaj kongresoj havas jam longan tradicion kaj sperton. Tia sperto devis instrui ĉiujn kiuj organizas. Ni ne scias kiu(j) kulpas. Ni nur konstatas.

Ni povis denove admiri la teatran kapablon de la grupo de Flego. Sed ni tre esperas ke en la venonta kongreso ĝi foje ludos ion alian. Verŝajne (kaj prave) ĝi pensis ke en la oriento la granda plimulto ne ankoraŭ vidis la teatran kreadon de Sartre, Cocteau kaj Ĉehof. La Bulgara teatro havis ankaŭ grandegajn meritojn. Tamen ni konsilas al ĝi elekti ion pli facilan. Ni ne vidas la necesecon nek dezirindecon imiti Shakespeare ĝis en la literatura formo.

La horoj estis belegaj. Ni neniam antaŭe aŭdis tiel belan « Espero » kiel en la inaŭguro, fare de tiu Sofia horo. Impona pro la amaso estis la Pola juna horo. Mi revis ke estis ĉiuj esperantistoj-junuloj kaj ke ili kantis la esperantajn kantojn kun plena konvinko. Tiam ni vere povus diri ke io nova venis en la mondo de la gejunuloj : nova idealo en kiu ili kredas kaj por kiu ili volas peni kaj oferi.

FEDERACIAJ SCIIGOJ

Lastmomenta Komunikilo :

estrarkunveno okazos je la

10-a horo &

ammin stranta kunveno je la

14 30 a horo

Dimanĉe la 6.10.1963

EJ. : MONICO NORD

GRUPA VIVADO

ANTVERPENŲ

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »
Poŝtĉeknumero : 726.54

La 14an de junio la vizito al la granda Antverpena foiro parte malsukcesis pro la vera veteraĉo. Tamen proksimume 20 gemembroj kunestis en « kermesa salono » por gustumi la tradiciajn vaflojn kaj babilu dum kelkaj horoj en agrabla sfero.

La 21an dum solenaĵo diplomoj pri elementa kapableco estis disdonataj al S-roj De Roover Kris, Verhees Maurice, Hendrickx Jacky, Boyden Bert, Hendrickx Roger kaj Smets Petrus kiuj sukcesis en la ekzameno. S-ro M. Jaumotte enkondukis la solenaĵon dum S-ro R. Hendrickx, nome de la lernintoj dankis la profesoron, S-ron L. De Marré. Tiu ĉi lasta respondis per laŭdaj kaj dankemaj vortoj. Kolortfilmo de S-ro R. Van Eynde « Feliĉa Juneco » (tradukita de S-ro H. Vermuyten kaj parolata de S-ro I. Durwael) kompletigis tiun programon.

Libertempaj raportoj estis la temo kiun S-roj R. Van Eynde kaj J. Verstraeten priiraktis dum la kunsido de la 28a.

La 5an de julio S-ro Eug. Paesmans gvidis la gemembrojn — fojon plitraparto de malnova Antverpeno. Se la promenado ne estis longa tamen la enhavo estis despli interesa. Vizito de la belega preĝejo Karolus Boromeus (kvazaŭ muzeo de arttrezoroj kun subtera tombejo), la lernejo « Hoger Handelsgesticht » apud la preĝejo, kelkaj pitoreskaj anguloj, gemaljunulejo, pentrin-da interna korto, k.t.p. estis tiom da agrablaj surprizoj kiujn la sperta gvidisto kompletigis per amaso da detaloj folkloraj aŭ historiaj. En « Rockoxkelder » trinkante freŝan glason da biero oni konkludis la promenadon dum kiu S-ro M. Jaumotte per kelkaj sinceraj vortoj dankis S-ron Paesmans.

La 12an F-ino Bl. Geers, S-ino R. Leecat, S-ro E. Claes kaj S-ro R. Van Eynde kun entuziasmo, bonhumoro kaj spriteco prizorgis la temon « Ĉirkaŭ la Fajro » kaj la 19an S-roj H. Vermuyten kaj R. Van Eynde elĉerpis « El la malnova Skatolo » por rakonti travivaĵojn el la pasinteco.

Pro la libertempa periodo la kunvenoj estas malpli ĉeestataj. Do la temoj estas adaptataj en tiu senco ; tial la 26an okazis agrabla kunsido dum kiu oni kartludis kaj babilis.

La 2an de aŭgusto S-ro Fr. Schellekens prezentis sian libertempan mozaikon. Per diapozitivaj kaj lerta komentario li efektive vekis la emon forvojaĝi al foraj landoj kaj ĝui sunplenan senzorgan restadon.

La 9an denove okazis agrabla kunsido kun kartludoj kaj babilado.

La 16an pro la antverpena generala kermeso ne estis kunveno.

Filma, Diapozitiva kaj Magnetofona Rubriko :

Nova filmo estas disponebla : « La Fonta Regiono de ambaŭ Netoj-riveroj ».

Filmo akirebla ĉe : Toeristische Federatie der provincie Antwerpen, Schoenmarkt, 2. Sonbendo ĉe : J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenweg, 1078, Hoboken.

Nova Esperanto-Ekspozicio en Borgerhout kaj Berchem.

Post la ekspozicioj en Deurne kaj Hoboken, kiuj estis realigataj en 1963 en la kadro de E.K.I. fare de la antverpenaj Esperanto-grupoj kaj en kiu « La Verda Stelo » ludas gravan rolon, nova ekspozicio en la komunuma festosalono de Borgerhout (antaŭurbo de Antverpeno) akiris rimarkindan sukceson.

Efektive pli ol 100 personoj vizitis la salonon (inter kiuj multaj gejunuloj) kaj montris sian intereson per daŭra informado. Diversaj interesuloj postlasis adreson por la sekvonta kurso. Ankaŭ la gazetaro vigle interesiĝis kaj favore raportis per vortoj kaj fotografajoj.

Jam nun EKI planas novan elmontron de Esperanto-viveco en Berchem je la 7a kaj 8a de septembro en « Showroom » de Etabl. Caremans. Grote steenweg, kontraŭ la urbodomo.

Geedziĝoj

La 29an de junio, geedziĝis en Wilrijk S-ro Henri De Hondt kaj F-ino Gerda Broeckhove.

La edzo estas denaskiĝa membro de « La Verda Stelo » kaj filo de S-ino J.

De Hondt, fidela membrino. La gepatroj de la juna edzino, — ambaŭ mortintaj dum kaj pro la milito, — ankaŭ estis fervoraj esperantistoj.

La kvar gepatroj cetere gefianĉigis en la rangoj de la Antverpena Grupo.

Al la feliĉa paro, al S-ino De Hondt kaj al la prizorgantaj gepatroj, G-roj Lenclaes-Gijselinc, niajn plej korajn gratulojn.

La 4an de julio, edziniĝis en Antverpeno Christiane Van den Bossche, ankaŭ membrino de « La Verda Stelo » kaj filino de la bedaŭrata direktoro de B.E.I.

Al la juna edzino kaj al ŝia edzo S-ro Jos Tuboville niajn plej korajn gratulojn.

Naskiĝo

Samajn gratulojn ni prezentas pro naskiĝo de eta Daniël, ĉe la esperantista paro, — Antverpenano kaj Bruĝanino —, G-roj K. Van Gompel-De Staercke, kiuj ambaŭ ekkonis unu la alian en Esperantujo.

Funebro

Sincerajn kondolencojn ni prezentas al S-ino Léa Bernaerts, fidela membrino de « La Verda Stelo », kies patrino mortis 90-jara, en ŝia hejmo en Wilrijk.

Laŭ peto de la kara mortintino, la enterigaj ceremonioj okazis en plena intimeco, sed ni prezentas tie ĉi al nia kara samideanino la esprimon de nia vera kunsento okaze de tiu ĉi grava bato.

LIEGA

Esperantista Grupo
20, rue Victor Raskin

Sabaton la 22an de Junio okazis en « La Maison des Jeunes » en Lieĝo, la oficiala fondiĝo de « Katolika Esperanto Grupo ». Tiu ceremonio dividiĝis en pluraj partoj. Ni rilatos ĉi-tie nur al la labora parto:

Rimarkindaj ĉe la podio estis: Sac. Beckers, pastro en Kwaadmechelen kaj prezidanto de I.K.U.E. S-ro Hoen, el Heerlen, redaktoro de « Espero Katolika ». D-ro Denoël, franclingva prezidanto de B.E.F., F-ino Champy, profesorino kaj animo de la movado en katolikaj medioj (kiu estis varme aplaudita). K-t-p. S-ro Touin prelegestro en Universitato de Loveno prezidis.

Sac. Beckers raportas pri la esparanta movado en Belgujo kaj pri la sinsekvaj rilatoj inter la neŭtrala movado kaj la katolika. Li klarigas rapide kio estas U.E.A. kaj B.E.F., I.K.U.E. kaj ĝia belga sekcio starigata aŭ pli ĝuste restarigata, S.A.T. kaj ĝiaj sekcioj franc kaj valonlingva kaj nederlanda laŭ la regionaj lingvoj. Li emfazas, same kiel faros poste S-ro Denoël, pri la neceseco de la enkonduko de Esp-o en katolikajn mediojn de la tuta Belgujo (gis nun, ĝi enpenetris nur la flandralingvan regionon).

D-ro Denoël klarigas kial, pro la dornoplena prilingva demando en Belgujo la neŭtrala movado dividiĝis kaj kiel ĝi reunuiĝis. Li citas la Papon Johano la

G. FAES

Eiermarkt, 21
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

XXIIIa kaj la feliĉa ekrego de ĝia anstataŭanto Paŭlo la VIA. Li emfazas pri la fakto ke la tempo estas favora por la fruktodonaj konversacioj kaj la unuiĝo de la spiritoj. Li komparas la tradukmaŝinojn, kiuj neniam estos aliaj aferoj ol robotoj sen propraj pensoj kaj sento, al Esp-o, ilo por unuiĝi la korojn kaj paŝo al tutmonda paco por ĉiuj bonvolemaj homoj.

S-ro Hoen parolas pri broŝuroj kaj libroj ĵus eldonitaj en la esp-ista katolika movado, kaj pri la organo de I.K.U.E.

Post la legado, fare de la sekretario, de la raporto pri lasta komitata kunveno, F-ino Champy senkulpigas plurajn geinstruistojn, foraj pro ekzamenoj. D-ro Denoël parolas pri la grava valoro de la geinstruistoj por la bonfarto de la internacia lingvo, li salutas, tiuokaze, S-ron Natalis, profesoro pri pedagogio en la universitato de Lieĝo, ĉeestanta la kunvenon; la profesoroj devas insisti pri la pedagogia valoro de esp-o. P-ro Natalis respondas aprobante S-ron Denoël: la lingvo de D-ro Zamenhof estas altvalore pedagogiema, ĉefe rilate al infanoj. Li rakontas kialmaniere, trovigante en Kongolando, li alkitimiĝis al gluigantaj lingvoj, li povis juĝi tiam, unufojon plue, pri la genio de la kreinto de esp-o.

F-ino Champy klarigas kiel funkciigi rapidkurson el kvin lecionoj por geinstruistoj. Si antaŭvidas, por la perfektiga kurso, la saman sistemon kiel por la elementa. Unutagan porgeinstruistan propagandon ni pripensas.

Elementaj diplomoj estas disdonataj: inter la ricevantoj troviĝas du instruistoj benediktinaj fratinoj. La malplej bona rezulto estas 84 %.

Sac. Moŝto Episkopo de Lieĝo, troviĝanta la saman tagon en Instituto « Marie-Thérèse » sin senkulpigis per letero samkiel abato el Dison kaj laiko el Luksemburgo.

Notinda estas ke ne estis necese traduki la esp-antajn paroladojn en francan lingvon kvankam preskaŭ la tuta kunsido okazis esperantlingve.

Noto: Ni pridiskutos la kreadon de ekzamenoj kaj diplomoj poste (elementa ekzistas, temas pri perfektiga por ĉiuj, kapabla por geinstruistoj kaj povanta gvidi kursojn por tiuj lastaj.)

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreneo de
KONSTRUAĴOJ

CHARLEROI Karlroĝa Grupo.

La Grupo de Charleroi estas tre afliktata pro la morto de S-ino M. Delforge la afabla edzino de sia membro.

S-ro Delforge, fervora kaj sindonema esperantisto de pli ol 25 jaroj estis jam trafita antaŭ du monatoj per la morto de sia 16-jara filio.



La meza grandeco de la homoj plaltiĝis dum la lastaj sepdek jaroj per 7 cm. Samtempe la kreskado plirapidigis kaj la korpo estas pli frue plenkreska. La kaŭzoj i.a. estas la pli bona nutrado kaj la malpli peza laboro dum la junaĝo.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj — Speguloj —
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
alumintaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

RE CENZ OJ

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (Sro Iserentant R.)
Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140.

Emba (Emeriko Baranyal); « Ekzilo kaj Azilo ». Poemaro verkita originale en Esperanto. 164 paĝoj. Prezo: 1.50 Us. Dol. en la serio de la Beletraj Kajeroj eldonis « Stafeto » de La Laguna, sur la Kanariaj Insuloj. Ne indiko de eldonnombro.

Pri multaj poemaroj ni jam devis esprimi rezervojn; ĉu pro la fakto ke ili estis tro malfacile kompreneblaj; ĉu ke ili ne estis sufiĉe poeziaj. Tiu-ĉi volumo plaĉos ne nur al poezi-amantoj, sed al ĉiuj kiuj ankaŭ nur iomete ŝatas poezion, kaj kiuj havas homan senton. La poemoj estas tuj kaj de ĉiuj kompreneblaj; kaj ili estas veraj, belaj poemoj. Niaj laŭdo kaj rekomendo estas senrezervaj.

La spiritostaton de la aŭtoro oni havas tuj, sur p. 20 :

En loko post la dors' de Dio,
en grize drona malproksim'
okzis eta tragedio:
patrino mia naskis min.

Belan enkondukon kiu bone montras la personecon de Emba, skribis la konata N. Bartelmes. La konfirmon de tio kion li skribis oni trovas sur preskaŭ ĉiu paĝo. Lia vivo estis seninterrompa revado, klopodado sekvitaj de malsukceso kaj elreviĝo. Rilate al la esperanto-movado eĉ, li eligis tiujn sentojn en la fama romano « Maria kaj la Grupo ». Tia tago kiun konas la ne-komprentanto kaj ne-sukcesanto estas bone priskribita en « Tago el mia vivo »:

Dumnokte : steloj, steloj ;
sopiraj songoj, fe-kasteloj.
Matene : kuro post fortune ;
kun nova suno novo nuno.
Dumtage : ŝvito, vana ago ;
kun nova tago, nova plago.
Jen ree mortis viv-espero ;
mi sidas stulte en vespero.

Admiru kiel delikate li priskribas sian malsukcesadon ; kaj kun kia humoro : « Nur Unufoje » :

Mi volus sole unufoje
la ĝustan tempon koni
kiam komencas dio ĝoje
feliĉon jam disdoni.
Kaj volus mi kun la hastantoj
en ĝusta tempo veni ;
kaj foje da donacoj diaj
nur etan sakon preni.
Sed ĉiam mi malfruas ; vane

pro kur' min ŝvito lavas,
se dio tiel largamane
malŝparan emon havas.

Tiuj kiuj estas revoluciemaj kontraŭ socia maljusteco certe ne ŝatos legi lian rezignacion :

« Ne timu, la falĉilon rektigitan
ne kaptos mi en tia hor' ekscita
por puŝi ĝin en iun moŝtan :
mi estas ja dresita ! »

Kontraŭe ; li fuĝas en iu filozofia prikonsidero kiu kondukas al kvietismo :

« Malgrase ili penis, grasis
alia — jen la vivrezulto.
Tiel do viv' ilia pasis ;
bone, ke restas jam nemulto. »

Belega kaj korporema estas la poemo « Tombo » kie li priskribas la ne-estimitan vivon de la terkulturisto kiu tamen, pro lia plej grava laborado, ebligas (plu) vivandon :

« ...Ne sonis hor' funebrofeste
nek tombceremonio,
nenia ŝanĝ', nur mortis beste
la vivsemanta dio. »

Bedaurinde estas ke ofte la plej grava elemento de la frazo ne estas sufiĉe reliefigita. Ekzemple, laŭ mia sento, la lasta verslinio devis estis presita en majuskloj.

La poemon « Al Forironto » dediĉitan al E. Lanti mi opinias ne tute sukcesinta. La poemoj « Renkontiĝo » kaj « Mia Patrino » bone ilustras la ĉiam revenantan temon en tiu kolekto : iam estis bone vivi ; belaj revoj ; poste venis la kruta realeco. Unu de la plaj belaj : « Al knabino palvizaĝa ». (p. 66) La poemo « Stulto » (p. 128) supozigas ke en junaĝo li kapablis verki belajn ampoemojn. Ĉu ili ekzistas ? kaj kie ili estas ? Mi citas ankoraŭ la lastan poemon ĉar ĝi estas bela kaj unu lojn pli montras lian animstaton : « Sinoj »

Cu estas io sur la tero
pli dolĉa ol la sin' patrino,
kien soifo je tenero
nin logas por luliĝ' intima ?
Cu estas io sur la tero
pli dolĉa ol la sin' virino,
kien la alta ammistero
nin logas por plezur' fascina ?
Cu estas io sur la tero
pli dolĉa ol la sino tera
kien la fata Furiero
nin lokas por ripozo vera ?

De la du partoj mi opinias la unua « Ekzilo » la plej bela.

Sajnas ke la aŭtoro, en siaj lastaj vivotagoj, ĝojegis je la sciigo ke Stafeto eldonos lian poemokolekton. Ĝi estas pia faro de Stafeto. Ni honorigu lian noblan memoron aĉetante la verkon KAJ ni legu ĝin pro la altnivela poezio.

Drs. F.R.

William Auld « Monda Kulturo » No 1 Aŭtuno 1962. Formato de la revuo « Esperanto » de UEA. 32 paĝoj. Prezo : 15 Ned. Guld. por jarkolekto de 4 numeroj.

Tiu unua numero tre plaĉis al mi. Ĝi prezentas novelon de Sandor Szatmari, la konata aŭtoro de « Vojaĝo al Kazohinio », « Feliĉa amo ». Marjorie Boulton, kiu jam pruvis majstri ankaŭ la fakon de la teatra skizo, publikigis en ĝi alian mallongan drameton « Nia Sango » kiu estas same animprema kaj atentokapta kiel multaj el ŝiaj plej bonaj. Sekvas artikolo ilustrita pri Japana filmfaranto ; kaj dua pri la Bulgaraj ludfilmoj. Nia juna poezistelo Edwin De Kock el Sud-Afriko antaŭmetas studon pri « iuj karakterizoj de la poezio ». L. H. Knoedt, nekonato kiu subite famiĝis pro bonega traduko de poemoj de la Brazilano Castro Alves, verkis tie-ĉi « La Perdita Lingvo ». Mi persone tre ŝatas

la ilustraĵoj « Pordo de l' forgeso » de P. Illessy. Kunlaboris plie Clelio Conterno kaj Japano Mijamoto Masao. W. Auld, la redaktoro, recenzas kvar eldonojn de Stafeto. Tre valora kajero kiun ni forte rekomendas... sed... la prezo estas iom alta.

Sono.

Hans Christian Andersen « La Marvirineto ». Luksa eldono kun ilustraĵoj de Gustav Hjortland. 53 paĝoj. Eldonis la eldonejo KoKo en Kopenhago en 1962. Ricevebla en nia Esperanto-instituto. Prezo: 30 steloj; 7.50 Guld.

Kelkaj esprimis al mi sian opinion ke oni tro eldonas en esperanto; kaj ke sekve la monpetado al la esperantistoj neniam ĉesas. Iuj eĉ demandis ĉu tiu « plago » ne foje finiĝos. Al ili mi devas respondi ke efektive tio ne ĉesos, kontraŭe pliampleksiĝos. Mi devas plue diri ke tio estos beno; kaj ke la kontraŭo estus katastrofo por niaj lingvo kaj movado. Kial? ĝi estas la vivo mem! Ĉiu vivanta, kulturon produktanta popolo faras tion; ĝi estas vivoleĝo interna. Ĉu vi pensas eble ke je iu nombro da esperanto-eldonaĵoj ni povus ĉesi, nombri kaj katalogi ilin kaj diri al la ekstera mondo; jen la cifero; per tio ni haltas; estas sufiĉe? Ĉu vi pensas ke ni povus iri al la ekstera mondo per eĉ tre riĉa provizo da nur malnovaj eldonoj, kiom impona ĝi cetere estu? Ni tre baldaŭ havas la famon de mortinta, en la estinto eble interesa, fenomeno. Kaj tiu famo spegulus la veron. Ni estas devigataj plu eldoni sur ĉiuj terenoj de la literaturo: la poezio, la prozo, la filologio ktp; ordinaraĵoj kaj luksaj eldonoj, ilustritaj kaj simplaj, plej eble varie. Nur tiam ni okupos indan lokon en la kultur-movadoj kaj nur tiam nia estonteco estas sekurigita. Plie, nur tiam ĝi garantias venontan venkon en la lukto por nia idealo. Se iuj esperantistoj malkontentiĝas pro tiu stato, kaj ne plu volas aĉeti kaj subteni, ili estas kompreneble liberaj en tio. Sed ili bone sciu ke ju pli da « samideanoj » rezignas en tiu tasko, despli malfacila estos la tasko de la aliaj, desmalpli estos nia progreso, nia prestiĝo. Estas en tiu senco ke ni bonvenigas ĉi-tium eldonon. Restas nur prilumi la manieron laŭ kiu la eldonantoj plenumis tion kion ili planis. En tiu-ĉi kazo ni devas diri: preskaŭ perfekte! Ni admiras tiun eldonon. Venas unualoke biografia skizo pri Andersen. Poste la fabelo mem. Post ĉiu paĝo ilustraĵo! La tutpaĝaj en la fabelo estas belegaj. Mi persone estus preferinta sur la librokovrilo ne desegnon de la marvirineto sed foton de la statuo en la Kopenhaga haveno. La stilo estas klara. Nur du aŭ trifoje la frazo estas malklara. Ekzemplo: paĝo 37, linio 8 estus pli klara se troviĝus « tiel ke pro vi... » kaj linio 10 devus teksti « por ke vi fariĝu... ». Kelkfoje staras la vorto « do » kiu ja montras konkludon, kie devus esti « tiam » kiu montras la tian situacion. Ekzemplo sur sama paĝo kaj sama linio 10: « do vi ne ricevos senmortan animon » devus esti « tiam vi ne... ». Same sur paĝo 38 linio 13. Estas la selaj rimarkoj pri tiu rimarkinda eldono.

Drs. F. Roose.

Hans Wingen « Wörter der Gegenwart » (Deutsch-Esperanto) eldonis Limburger Verlagsdruckerei Limburg/Lahn. 55 p. Prezo: 3,90 M. aŭ 13 st.

Tiuj vortlistoj jam aperis en la numeroj de « Germana Esperanta-Revuo ». Kvankam ne fakvortaro, ĝi donas la tradukon de tre multaj terminoj el diversaj fakoj. Tio montriĝis necesa ĉar la hodiaŭaj scienco kaj tekniko tiel rapide evoluas ke mankas en niaj vortaroj multaj necesaj vortoj. Ankaŭ multaj de niaj legantoj kiuj konas pli aŭ malpli la Germanan lingvon povos bone uzi ĝin; kaj eĉ ofte bezonos ĝin.

Erich Scheurmann: « La Papalagoj »: paroladoj de Oceania tribestro. Tradukis F. Faulhaber. Eldonis: S.A.T. Avenue Gambetta 67 Parizo 20. 80 p. Prezo: 2 guld. aŭ 2,70 n. F.F.

Tre interesa libreto! Tuiavii, la kristanigita Oceania tribestro, estas pensanta kaj observanta homo. Ne nur la moroj sed ankaŭ la pensoj de la blankuloj (= la papalagoj) estas por li tiel novaj, nekutimaj kaj do strangaj; ofte preskaŭ ne kompreneblaj. Liaj rimarkoj pri ili estas trafaj, kaj eĉ kelkfoje malkovras faceton kiun ni mem ne agnoskas. Aŭ li eĉ malkovras esencan veron al ni kiun ni, hipokrite, ne volas agnoski. Ekzemple kiam li diras ke la blankuloj proklamas Kriston kiel Dion, sed ke envere ili havas la monon (peco da metalo aŭ da papero) kiel dion. Se ni volas kompreni kio okazas en la antaŭaj kolonioj, ni devas aŭskulti la voĉon de enlandanoj kaj klopodi por kompreni ilin. Do, aĉetu kaj legu tiun-ĉi libreton.

La « Lingvaj Respondoj » de Dr. L.L. Zamenhof.

Kvankam ne envenis ĉe la redakcio ekzemplero por revizi, ni opinias ke estas tamen nia devo atentigi niajn legantojn pri la reeldono de tiu verko. Estas la kompetenta Prof. G. Waringhien kiu prizorgis tiun sesan eldonon (la aliaj estas ne plu haveblaj) kaj la « Esperantaj Francaj Eldonoj » (Rue P. Vergnes 11, Marmande) kiu efektiviĝis ĝin. En la enkonduko Prof. Waringhien skizas la historion de tiuj lingvaj respondoj. Li ankaŭ povis profiti pro la intertempe trovitaj pliaj dokumentoj. Ĉiu kiu iom pristudas nian lingvon, aŭ kiu volas koni la originon de multaj eroj de ĝia gramatiko, devas nepre posedi la verkon. Ne plu troviĝas en ĝi la « Letero pri la deveno de Esperanto ».

La « Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro » anoncas la baldaŭan aperon de la traduko de kelkaj eminentaj Brazilaj verkoj pri literaturo, scienco, tekniko kaj filozofio. La unua prezentota verko estos: « Imperativoj de la Vivo » de la filozofo Huberto Rohden.

Por interesiĝantoj jen la adreso: Caixa Postal 3677. Cetere ni plu informos niajn legantojn kiam ni mem ricevos ilin.

Nova revuo: « Homo kaj Kosmo ».

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis la unua numero de nova populara naturscienca Esperanto-revuo « Homo kaj Kosmo ». Certe tiu unua numero donas tre favoran impreson kaj ni ja esperu ke la revuo konservos la plaĉan aspekton kaj la interesan enhavon, kiun ĝi montris per ĉi tiu ekzemplero.

Mirinde kaj aplaŭdinde estas ke la eldono rezultas el la fervoro de kelkaj entreprenemaj gejunuloj el Zagreb, kiuj kolektiĝas en la ticia astronomia observatorio, kaj kiuj jam efikigis rimarkindajn pruvojn de sia nestingebla aktiveco. Ni citu ke ili eldonis interesan libreton esperantlingvan okaze de la totala sun-eklipso de 1961, kaj ke ili starigis somerumejon ĉe la Adriatika Marbordo en Primošten.

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING

ROSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GARDIJNEN - LODENS
STIJLVOEL MAATWERK


KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

LABATIO FOR ESP. NAŬTISTOJ

Nun tiuj gejunuloj plu portas la standardon per la eldono de alloga revuo, speciala destinata por sciemaj gejunuloj, sed nepre ankaŭ plaĉanta al multaj penkreskuloj. La enhavo estas varia sed temas grandparte pri astronomio kaj pri la nova sensaciiga ero de la nuntempa scienco: specveturado. Inspiraj cilajoj de famaj sciencistoj, interesaj anekdotoj, spritaĵoj, paĝoj por komentantoj, novaĵoj, komunikoj kaj propagandoj bonguste intermiksiĝas inter pli seriozaj artikoloj. Oni nur povas bedaŭri ke kelkaj tekstoj estas tro materiismaj kaj ke la ĝenerala enhavo suferas pri la kancero de multaj Esperanto-revuoj: ĉiuflanke oni atentigas pri la fantomego de la atombombmilito kiu minacas la homaron.

Eldonaĵoj de tiu kategorio certe estas bonvenaj, ĉar ili nepre povas vekti la atenton de eksteruloj. Tial mi varme rekomendas la revuon al tiuj inter ni kiuj deziras scii ion tiel pri la kosmo kiel pri nia planedo. La revuo aperos kvarfoje en la jaro, kaj ĉiu numero enhavas 32 paĝojn. La jarabono estas 75 belgaj frankoj. W. De Smet, Hendrik Meyslaan 9 Deurne, p.ĉ. 422 398.

Mi trovis malantaŭ la kulisoj de la Internacia Teatro en Sofia diversajn perukojn, sed la biletoj kun la indiko pri la jaro estis neĝuste fiksitaj. Post iom da peno mi retrovis la gustan sinsekvon. Ĉu ankaŭ vi foje klopodos?



6 -- 0291	3 -- 1830
5 -- 1650	2 -- 1925
4 -- 1630	1 -- 1780

GUTOJ ...

Eble vi scias, ke la enklanko de Johano XXIII « Pacem in terris » baldaŭ aperos en Esperanto. Sed ĉu vi scias, ke la Esperanto-teksto estos disdonita al ĉiuj partoprenantoj en la dua parto de la vatikana koncilio, kaj havos latinlingvan enkondukon speciale redaktitan por altiri ilian atenton sur la eblecoj de nia lingvo?

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI AĈETAS ĈE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559
detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo: ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj sviasaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Abdijstr. 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2